

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

N-o 50, 18. sept. 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

★ Eliras semajne. ★

# Nova Sukceso de Esperanto.

**Internacia Ligo por la Defendo de l' Raitoj de la Popoloj  
(Ligue Internationale pour la Défense des Droits des Peuples)  
akceptis Esperanton kiel duan oficialan lingvon apud la franca.  
(Legu detalan raporton sur la 2-a paĝo.)**

## Johano Baudouin de Courtenay.

En la nuna jaro ni festas iom malfruigitan jubileon de unu el la plej perfektaj kaj konataj lingvistoj: la sesdekjaran sciancan laboron de profesoro Johano Baudouin de Courtenay. Ni rimarkis, ke bedaŭrinde nenlu el niaj gazetoj dediĉis iom da spaco por honoru tiun ĉi simpatian blankbarbulon, kiu estas laŭ mia opinio la plej klera en Polujo kaj al' kiu ankaŭ nia movado multon ŝuldas.

Li naskiĝis en Radzymin apud Varsovio la 13. marto 1845; fininte la realgimnazion en Varsovio, li vizitis la Ĉefan Varsovian Lernejon kaj ankaŭ la Universitatojn en Jena, Berlin, Petrograd, Leipzig kaj Milano.

Li akiris la diplomojn de magistro de l' sciencoj filologie-historiaj en Ĉefa Lernejo Varsovia (1861), de doktoro de l' filozofio en Leipzig (1870), de magistro de kompara lingvoscienco kaj fine de doktoro de kompara lingvoscienco.

Li estis docento de privata universitato en Petrograd (1870), poste profesoro en Kazan (de jaro 1874), Dorpat (de 1883), Krakovo (de 1894), Petrograd (de 1900). De jaro 1918 li estas honora profesoro de Varsovia Universitato. Li estas membro de la Pola Akademio Scienca, de la Petrograd'a Akademio de Sciencoj kaj multaj aliaj societoj polaj kaj fremdlandaj.

Jam de juneco li laboris science, aperigante multajn tre ŝatatajn verkojn en diversaj lingvoj. La plej gravajn studojn pri pola lingvo oni ŝuldas al li.

El la ĝeneralaj problemoj de lingvoscienco interesis lin de longe la rilato inter la ekparolo kaj skribarto kaj la demando pri lingvo artefarita.

Ne estas eble al ni — pro manko da spaco — detale eĉ citi liajn verkojn. Li estas unu el la plej laboremaj kaj fruktodonaj sciencistoj tutmondaj.

Pleje interesas nin lia rilato al lingvo internacia ĝenerale, kaj al Esperanto speciale.

Li estas unu el la unuaj sciencistoj kleraj, deklarintaj la eblon krei lingvon internacian. Li

apartenis al la fama Delegacio por Elekto de Lingvo Internacia, elektita la 25. junio 1907 ĝia vicprezidanto. Kiam oni komencis paroli pri reformoj, prof. Baudouin de Courtenay skribis tiam en la „Progreso“: „... tiu tendenco al la reformoj venas de l' inklino serĉi truon sur la tuta bona, t. e. ofta fikado de Esperanto sen sufiĉaj motivoj...“ Vidante la daŭran reformemon kaj antaŭvidante la malprosperon de la Delegacio, li eksciĝis post nelonge el la komisiono.

Ofte li defendis Esperanton kaj ĝenerale la ideon pri lingvo internacia, ĉu skribante artikolojn en diversaj gazetoj (en „Espero“, „Progreso“ k. a.) ĉu eĉ eldonante apartajn broŝurojn („Pri kritiko de lingvo internacia“ en germana lingvo).

Ofte invitate de Varsovia Esp. Societo, li volonte tie prelegadas pri la demando de lingvo internacia kaj pri ĝia solvo — Esperanto.

*Salo Grenkamp.*

## I-a Kongreso de Idistoj (6.—9. aŭgusto en Wien).

Erara estas la opinio, ke ni devas tute ignori la agadon de niaj kontraŭuloj, precipe se ili, kvankam per neĝustaj rimedoj, batalas por sama celo kaj tial estas des pli danĝeraj por la ĝenerala samcela movado. Male, ni devas bone observi ilin, por ke ni ĉiam estu pretaj montri al la mondo la veran situacion per faktoj. La mondo — en nia kazo la novuloj, al kiuj unufoje sin prezentas la mondlingva problemo — ja nenion scias pri la diferenca taŭgeco kaj disvastigiteco de la diversaj „mondlingvaj“ sistemoj. La mondo ne scias, ke la pretendataj „plibonigoj“ de ldo grandaparte estas nur komplikigoj de la lingvo, kaj ke entute antaŭtempa reformo estas danĝeriga por la tuta afero. Ĝi ne scias, ke Esperanto nun marŝas de venko al venko, dume ldo nur kunprofitas je la laŭroj de Esperanto.

Nun okazis la brila XIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Praha, kaj ne tre malproksime de ĉi tiu ĉefurbo de la ĉeĥoslovaka respubliko, en Wien, la ĉefurbo de Aŭstrio, preskaŭ samtempe

ĉiutaga vivo“. Efektive, en la intencata plano la decimaleco ludas nenian esencan kaj lingvan rolon. Ĝia ofico estos organiza, koresponda, kvazaŭ nur simple administra. Ĝi nur utilos, por disdividi la laboron laŭ jam pretaj fakoj. [Kiam ni ekloĝas jam pretan, okaze dek-ĉambran domon, ni tute bone povas aranĝi en ĝi nature nian vivon, kvankam ankaŭ la homa loĝado ne evoluis „dek-ĉambre“.] La decimale klasado estos por ni jam preta domo; ĝia ĉefa bono estas nur, ke ĝi jam prete ekzistas, ke ĝi estas sufiĉe diskonata kaj ebligas senfinan disvolviĝon de modeste komencita entrepreno.

Se en nia domo la deka ĉambro ne estos utila, tiam ni ĝin simple ne uzos; se, kontraŭe, dek-unuan ĉambron ni bezonas, tiam ni senĝene ĝin konstruos. De la jam preta klasado ni ne estos sklavoj; ĝi kontraŭe estos nia laŭvola servanto. Eble ne tre logike malsamaj metlistoj loĝos en sama ĉambro. Tute same, kiel en la praktika vivo, tio ne estos tre grava, se nur ni konas iliajn adresojn, kaj se la komuna laboro efektiviĝos.

La alpreno de tia ĝenerala klasado, kun dividoj kaj diversgradaj subdividoj ĉefe staras por ni sur tiu ĉi principo, ke la laboro por teknikaj vortaroj senfine plimultiĝos, kaj dume unu sola direktoro ne povos persone rilati kun senfine kreskanta nombro da kunlaborantoj. Tiel ili are grupiĝos laŭ fakoj kaj subfakoj kun ĝeneralaj kaj diversgradaj fakestroj. Nur kun ĝeneralaj fakestroj rekte rilatos la Direktoro, ĝeneralaj kun duagradaj, ktp. Tiel kun kreskanta nombro da fakoj ne kreskos senfine la laboro de unu persono, sen la nombro de ĝiaj helpantoj.

okazis la „Unesma Kongreso por la Lingvo Internacia Ido“, — la unua kun pli ol 2000, la alia kun 130 efektivaj partoprenantoj (laŭ „Sulsian Idisto“).

Sabate la 6-an de aŭgusto je 10 h. okazis antaŭkunsido de la idista kongreso en la domo de l' ĉambro por komerco kaj industrio en Wien. Oni elektis prezidanto de la kongreso d-ro Schneberger el Lüsslingen (Svitsl.), Heinrich Peus el Dessau (Germl.) kaj Per Ahlberg el Stockholm (Sved.), sekretarioj s-ojn Janotta kaj Pignal el Wien.

La unua ĝenerala kunsido okazis sabate posttagmeze kun 130 ĉeestantoj el 13 landoj. Post lego de saluttelegramoj kaj -leteroj prez. Schneberger malfermis la kongreson atentigante, ke li, nun estante la prezidanto de la unua ldo-kongreso, en 1906 prezidis la Duan Esp. Kongreson en Genève. Post raporto kaj malsarĝo de la Prepara Komitato salutis la reprezentantoj de la diversaj landoj. Fine de la kunsido je 18 h.

Dimanĉe matene okazis specialaj kunvenoj; dume 30 kandidatoj — plejparte germanlingvuloj — estis ekzamenataj kaj ricevis „ateston pri docado“. Posttagmeze estis laborkunsido, en kiu duon-esperantisto, s-o majoro Tanner, „en lingvaĉo“ qua estis Espo mixta kun kelka ldo-vortoj proponis, ke la idistoj helpu finance la starigon de monumento al d-ro Zamenhof kaj ke la idistoj aliĝu al UEA, kie ili propagandu por lingvaj plibonigoj. Liaj proponoj ne estis diskutataj, ĉar ili ne estis oficialaj.

Lundon matene kelkaj ekzamenitoj de l' antaŭa tago ekzamenis aliajn samideanojn „pri lernado“, samtempe okazis specialaj kunvenoj. Posttagmeze s-o Kurt Feder el Frankfurt donis raporton pri la Akademio kaj interalie klarigis sencon kaj motivojn de la stabileco (!). Poste oni plendis pri malbona aŭ eĉ malĝusta stilo de kelkaj ldo-libroj kaj decidis, ke ĉiu gramatika verko antaŭ la preso devas esti korektata de la Akademio.

Marde oni longtempe debatis pri la reorganizo de la „Uniono“. Fine oni elektis komisionon, kiu studis la novan formon de la organizado de la

Principe ekzistas dek ĝeneralaj fakoj, kiuj grade disfakigos laŭ la jam pretaj dividoj, — aŭ proksimume, — kiam plimultiĝos, plidiversiĝos kaj plispecialiĝos la kunlaborantoj.

Laŭ tiuj ĉi dek ĝeneralaj fakoj oni jam nun povas jene dispartigi la ĝisnunajn kunlaborantojn:

## Laŭfaka Divido de la Kunlaborantoj.

### Ĝeneralaj fakoj.

BIBLIOGRAFIO: s-o Francesco Pizzi.

### Filozofio.

D-ro E. Dittrich, s-o Georg J. Meyer, d-ro Paul Rumpel.

### Religio.

TEOLOGIO: s-o Georg J. Meyer, d-ro Siegel.

### Sociaj Sciencoj kaj Juro.

SOCIOLOGIO: s-o Kurt Kauffmann.  
POLITIKA SCIENCO: d-ro Edm. Privat.  
EKONOMIO PUBLIKA: s-o Norman W. Frost, s-o Kurt Kauffmann, s-o Václav Nemeč (banko), d-ro Paul Rumpel.  
JURO: s-o McConkey (juro internacia), d-ro Paul Rumpel.  
PUBLIKAJ FINANCOJ: s-o Karl.  
PEDAGOGIO: s-ino F. Hörnig.

### Filologio.

FILOLOGIO ĜENERALA: s-o Ĉernohostov, d-ro E. Dittrich, s-o Rudolf Fridrich (gramatiko), s-o G. Kayser, s-o Georg J. Meyer, s-o Vilho Setälä, d-ro Siegel.

## Esperantista Akademio.

Sekcio por la Scienca kaj Teknika Vortaro.

*Dua Cirkulero de la Direktoro.*

Karaj Kolegoj!

Kvindek-kvin samideanoj ĝis la 20-a de julio respondis la alvokon de la unua cirkulero pri ellaborado de la teknikaj vortaroj.

El ili kvindek proponis sian kunlaboron en unu aŭ en kelkaj fakoj; du ne difinis ian fakon; du nur esprimis opinion pri labormetodo; unu sendis teknikajn katalogojn, kiel prilaboreblan materialon.

Al ĉiuj respondintoj la Direktoro ne povis skribi persone. La tuta esperantistaro certe konsentos kun li por esprimi al siaj kolegoj, kiuj komprenis la gravecon de la nuna tasko, sian plej koran kaj sinceran dankon.

\* \* \*

La aludo pri decimale klasado okazigis kelkajn kritikojn, ĉar oni ne ĝuste sciis, kiamaniere estas intencata ĝia uzado.

Unu korespondanto opiniis, ke cent fakoj estas tro granda nombro, kaj proponis ĝin malgrandigi ĝis nur dudek fakoj. Oni poste vidis, ke la nombro da fakoj neniel estas rigide antaŭfiksita; ĝi grade pligrandiĝos laŭ la nombro de la kunlaborantoj kaj precipe laŭ ilia specialeco; nur por praktika oportuneco ĝi dividiĝos laŭ diversgradaj subfakoj.

Alla respondinto sprite kaj ĝuste rimarkigis, ke la homaro ne evoluis podeke, kaj ke Zamenhof kreis majstroverkon, simple ĉerpante el la

# Esperanto en la Internacia Kongreso por la Defendo de la Rajtoj de la Popoloj.

Idistoj. Kiel kongresurbo por 1922 estis elektata Dessau en germana ŝtato Anhalt, kie s-o Peus estas redaktoro de ĉiutaga ĵurnalo, prezidanto de l' Anhalt'a parlamento kaj de la urba konsilantaro.

Rimarkinde estas ankoraŭ, ke la nederlanda ministro por instruado delegis s-on prof. Yzerdraat kiel sian oficialan reprezentanton.

La raportisto de „Suisian Idisto“ diras, ke la unua kongreso de Idistoj plene sukcesis kaj ke oni bone interkompreniĝis malgraŭ la diversaj patrollingvoj. Interesa estas tamen la fakto, ke sub la titolo de la lasta numero kaj super la raporto pri la kongreso, la redaktoro alvokas la idistojn viziti la kunvenojn de la grupoj, por ke ili lernu paroli.

\* \* \*

Ni ne intencas doni komenton al ĉi-supra raporto. Cetere tiu kongreso, malgraŭ ĝia „plena sukceso“ kaj malgraŭ la „bona interkompreniĝo“ de ĝiaj partoprenintoj, ne povas iel maltrankviligi nin aŭ eĉ unu metron deflankigi nin de nia rekta vojo alcela. Sufiĉas ja nura komparo kun nia brilege sukcesinta XIII-a por tuj forigi ĉian eventualan dubon. Pli bonaj je Esperanto estas iam dezirindaj, sed nuntempe tute ne necesaj kaj hodiaŭ nepre antaŭtempaj. Antaŭe ni venkantu la ideon de lingvo internacia per la sistemo jam multe disvastigita, jam ofte elprova, poste estos ankoraŭ sufiĉege da tempo por plibonigi la formon!

## Postsonoj de la XIII-a.

### La Karavano de UEA.

Bonege sukcesis la karavano de UEA al la XIII-a, modele aranĝita de s-oj L. Poncet en Lyon kaj M. Genermont en Moulins.

La organizintoj eldonis tri cirkulerojn antaŭ kaj kvaran post la kongreso. Entute partoprenis en la karavano 38 personoj el 6 diversaj landoj: 1 belgo, 1 brito, 22 francoj, 9 hispanoj, 1 rusino kaj 4 svisoj. Por la organizintoj ricevis 6 telegramojn, 138 leterojn kaj poŝtkartojn kaj 5 presajojn kaj sendis 5 telegramojn, 110 leterojn kaj poŝtkartojn kaj 276 cirkulerojn kaj presajojn de 11. nov. 1920 ĝis 26. julio 1921.

Dumvojaĝe oni faris 47 diversajn fotografadojn, el kiuj ĉiu kosta 0,65 fr. fk. plus sendokosto (riceveblaj de L. Poncet, Lyon, 36, rue Victor-Hugo).

Venontan jaron oni intencas aranĝi similan karavanon al Helsinko (per specialaj vagonoj al Antwerpen, de tie per speciala ŝipo al Helsinko).

### Ekskurso al Moravia Karsto.

Pri la ekskurso al Moravia Karsto ni ricevis denove du alskribaĵojn, kiujn ni ĉi-sube publikigas. Sed ni atentigas, ke ili nepre estas la lastaj pri tiu temo kaj ke ni ne akceptos pluajn; ĉar la ekskurso estis nur flanko afero de la kongreso, kaj — konsiderante la brillan sukceson de la kongreso mem — ni forgesu pri la malagrablaĵoj kaj ne kreu malkonkordon pro ili. Unu estas voĉo de brita partopreninto en la ekskurso, alia estas oficiala klarigo de la ĝen. sekr. de la kongreso. Krome ni petas korekti en nia kongresraporto, ke la brita samideano plendinta en publika kunsido pri la aranĝo de l' ekskurso, s-o Br. el Cr., nenion diris pri sia aĝo (ĝi estas 71, ne 60), sed ke li havas pli ol 50 jarojn da spertado pri aranĝo de vojaĝoj, ekskursoj ktp. kaj neniam en sia vivo li vidis ekskurson tiel malbone aranĝitan.

Alla brita samideano, s-o R. el London, skribas al ni jenon:

### Natursciencoj.

GENERALE: s-o Eugen Wüster.  
MATEMATIKO: s-o Venancio Deulofeu, s-o K. Hendel, s-o Ir. J. R. G. Iskrücker, s-o A. Mazzolini (geometrio), s-o René Mesny, s-o W. W. Padfield, s-o Vilho Setälä, s-o Petro Stojan, s-o Eugen Wüster.  
ASTRONOMIO: s-o Petro Stojan.  
FIZIKO: s-o J. R. G. Iskrücker, s-o L. M. Kanervo, s-o E. Lefèvre, s-o René Mesny, s-o Vilho Setälä, s-o Petro Stojan.  
ĤEMIO: s-o Venancio Deulofeu, d-ro W. Döhler, d-ro A. Jentsch, s-o L. M. Kanervo, s-o E. Lefèvre, s-o Vilho Setälä.  
BIOLOGIO: d-ro W. Döhler, d-ro A. Jentsch, s-o M. C. Mc Conkey.  
BOTANIKO: d-ro A. Jentsch, s-o Vilho Setälä.  
ZOOLOGIO: d-ro W. Döhler, s-o Vilho Setälä, s-o Petro Stojan (ornitologio).  
GEOLOGIO: s-o Petro Stojan (mineralogio), d-ro Wohlstadt.  
METEOROLOGIO: s-o Petro Stojan.

### Sciencoj Aplikitaj.

MEDICINO: d-ro Bluth, d-ro Andreo Fišer, d-ro P. Vanverts, d-ro Leon Zamenhof (anatomio).  
INGENIERARTO: s-o Brettman, s-o Arthur Brown, s-o Rudolf Fridrich, s-o F. O. Lechmere-Oertel, s-o Lefèvre, s-o W. W. Padfield, s-o Francisko Schneider, s-o Ch. Tiard.  
ELEKTROTEKNIKO: s-o Eskil Håkansson, s-o Willy Heinze, s-o J. R. G. Iskrücker, s-o René Mesny (telegrafio senfadena), s-o Majoro R. Raven-Hart (telegrafio, inkluzive senfadena).  
MARISTAĴOJ: s-o René Mesny, s-o Rollet de l'Isle.

Kiel raportanto pri ekonomiaj aferoj mi ĉeestis la unuan „Internacian Kongreson por la Defendo de la Rajtoj de la Popoloj“ (Congrès Internationale pour la Défense du Droit des Peuples), okazinta en Genève de la 1-a ĝis 10-a de septembro 1921.

Mi uzis la okazon agi ankaŭ por Esperanto, kaj mi sincere dankas al mia senlaca kolego d-ro Edmond Privat, kiu laboris por la sama celo kaj kies influo forte helpis la sukceson de miaj penadoj. Jen la rezulto:

1. La „Internacia Ligo por la Defendo de la Rajtoj de la Popoloj“ (Ligue Internationale pour la Défense des Droits des Peuples) akceptis en sia regularo la sekvantan § 10: „La lingvoj oficialaj de la Ligo kaj de ĝiaj universalaj kongresoj estas la franca kaj la neŭtrala helpa lingvo Esperanto.“

2. En la oficiala organo de la Ligo oni konstante raportos pri Esperanto kaj aldonos esperantan resumon al ĉiuj gravaj artikoloj.

3. La Ligo havas specialan „Esperantan Sekretariejon“.

4. Post publika parolado de s-o Privat pri la „justeco en la lingva demando“, la kongreso akceptis unuanime la sekvantan rezolucion:

La Kongreso por la Rajtoj de la Popoloj, konstatante, ke la reĝimo lingva, nun reganta en la interrilatoj internaciaj, estas malproksima realigi la maksimumon de oportuneco praktika kaj de egaleco por ĉiuj, kio estas forte dezirinda, postulas de la Ligo de Nacioj rekomendi plej baldaŭ al siaj membroj la laŭgradan enkondukon de Esperanto en siajn publikajn lernejojn, kiel helpan lingvon, kiu faciligas la rektan kontakton inter la popoloj kaj ties kontrolon de la internaciaj rilatoj.

Publike mi volas danki al s-o René Claparède (sviso), f-ino d-ro M. Rusiecka (polino, la „animo“ de la tuta movado), s-o Mohamed Fahmy (egipto), s-o d-ro Tryphon Grécowe (makedoniano), s-o prof. Bedri Pejani (albano), s-o Haroun Alitcha (turko), s-o Aly Shamsy (deputito de Egiptio), pastro F. Balmas (italo), grafo Lucidi (italo), s-o Montchal (sviso), f-ino Marshall (anglino), s-o Christian (Slovakio) kaj s-o Stepankowsky (ukrainiano) pro la fervoro, per kiu ili apogis Esperanton.

Konkludo: Dum la 13-a Univ. Esp. Kongreso en Praha, okazis speciala kunveno de la anoj de „malgrandaj nacioj“. Oni decidis la fondon de aparta Esperanta Ligo tiucela, proponita de s-o Bockowsky (ukrainiano). Mi kredas, ke tia aparta Esperanta Ligo estis tiam pravigebla, ĉar ankoraŭ ne ekzistis ia internacia (ne-esperantista) organizaĵo samcela, kiu akceptis aŭ nur toleris Esperanton. Nun, post kiam la „Ligo por la Defendo de la Rajtoj de la Popoloj“ decidis akcepti Esperanton plenvale (kiel duan lingvon!), mi kredas, ke aparta, separata Ligo Esperanta estas superflua. Oni donis al ni, esperantistoj, ĉiujn rajtojn postuleblajn en granda internacia asocio, influa kaj agema! Nun ni laboru interne de ĝi! Nia propagando ja estas pli efika, se ni povas ĝin fari interne de ne-esperantista societo, ol se ni laboras separate inter ni.

Al la atento de ĉiuj „malgrandnacionoj“ mi do rekomendas la „Ligon Internacian por la Defendo de la Rajtoj de la Popoloj“ (adreso: Genève, rue Prairie 17) kaj mi esperas, ke la esperantistoj organizos sin interne de ĝi: por la bono de la movado malgrandnacia kaj pro intensa propagando de Esperanto.

Hj. Unger, Zürich,  
redaktisto de „Int. Kom. Revuo“.

Rilate al Moravia Karsto, mi — spite miajn sesdek jarojn — tute ĝuis la aferon. La longaj fervojaĵoj donis al mi plu da horoj por interbabilado, por kunamikigi kun novaj samideanoj. Mi ĝuis ankaŭ la marŝadon piede de Blansko al la kaverno en belega pejzaĝo. La malagrablaĵojn mi facile povas forgesi pro la tute neforgesebla amikeco de miaj kunvojaĝantoj kaj grandiozeco de la grotoj. Kiel esperantisto mi estas antaŭenrigardanto, ne malantaŭen!

S-o Pitlik, ĝen. sekr. de la kongreso, klarigas la aferon jene:

En la oficiala protokolo de la tria labor-kunsido oni legas laŭvorte la jenon:

„Antaŭ ol oficiale malfermi la kunvenon, la prezidanto senkulpiĝas la Lokan Kongres-Komitaton pri la lona longe daŭranta ekskurso al M. Karsto. Tiun ekskurson aranĝis la Esperantista Klubo en Brno (Moravio) kun helpo de Ĉeĥoslovaka Vojaĝa Kancelario. S-o Warden diras, ke neniu homa ago estas perfekta, tamen tiu aserto devas esti por ni plia instruo. Li kredas, ke la malfacilaĵoj de la Loka Komitato estas pliiĝitaj per tiu fakto, ke multe da partoprenantoj anoncis sin en la lasta momento; tio malebligis antaŭvidi

la nombron de ekskursantoj. Estas malfacile, kiam oni antaŭvidis kaj preparis vojaĝon kaj tagmanĝon por 400 personoj, akcepti pli ol 1000. Li dankas la Lokan Komitaton pro la multnombraj laboroj okaze de tiu kongreso kaj petas la kongresanojn, ke ili bonvolu memori pri la bela impresio, kiun ili havis en la belegaj subteraj grotoj kaj forgesu la lona longan kaj ebte malkomfortan vojaĝon.“

Al la oficiala deklaro de d-ro Kamaryt kaj la vortoj de la konata skota pioniro de Esperanto s-o Warden, kiu sciis taksu la mortlacigajn laborojn porkongresajn de la Loka Kongresa Komitato, mi aldonas:

La aranĝon de la ekskurso al Moravia Karsto transdonis la Loka Kongresa Komitato post interkonsento al Ĉsl. Vojaĝ- kaj Transport-Oficejo (fervoj-vojaĝon al Blansko kaj reen), al Turisma Porfremdula Asocio en Brno kaj Esperantista Klubo en Brno (restadon en Blansko kaj viziton de la grotoj), kiuj havas sian sidejon proksime de la nomitaj grotoj. La vagonaro pro difektiĝo de la lokomotivo malfruigis je kelkaj horoj, kio kaŭzis haŭson en la tuta aranĝo kaj la malfruan revenon. (Laŭ la de la fervojdirekcia fiksita horaro la vagonaro devis atingi Blansko'n je la 12-a kaj forlasi ĝin je la 21-a) Ĉsl. fervojministerio promesis doni rabaton de 50% sed 3 tagojn antaŭ la ekskurso la fervojdirekcio malaltigis ĝin je 33%. Direkcia de la grotoj promesis al la L. K. K. doni 50% enrabaton, sed donis al la aranĝintoj sole 22%. Sekretario Pitlik aranĝis la saman tagon ekskurson al Karlův Týn, kiun li ĉeestis kaj kiu sukcesis. La kulpo de la Loka Kongresa Komitato kaj ĝia ĝenerala sekretario rilate al la nesukceso de la ekskurso al Moravia Karsto estas, ke ili fidis la taŭgecon de la suprenomlitaj institucioj.

Oni riproĉas ankaŭ neordon en la Akceptejoj. Ĝin kaŭzis unualoke tiuj kongresanoj, kiuj tute ne resendis la aliĝilon, kaj ankaŭ tiuj, kiuj resendis ĝin, ne respondinte la demandojn sur la 2-a paĝo (loĝado kaj partopreno je distraĵoj). Da tiaj estis unu triono!! Malgraŭ tio la aranĝantoj penadis ĉiuforte kontentigi ĉiujn, plenumante dum la antaŭkongresa (dekmonata) tempo oftege eĉ dezirojn, kiuj havis nenion komunan kun la kongreso, kaj oferante al la aranĝo de la XIII-a eĉ multe da sia privata mono.

Sola rekompenco por la dekmonataj senlacaĵoj klopodoj al la L. K. K. estas 1. multnombraj dankleteroj de la ĉefaj esperantaj pioniroj, kiuj sciis taksu la faritan laboron de kelkaj fervoruloj de Praha kaj senkulpiĝi hazardajn erarojn ne antaŭviditajn; 2. la scio, ke ĝi laboris honeste kaj ofereme por afero bona.

Kongresanoj ne estas sole turistoj, sed ankaŭ „batalantoj“ por la „interna ideo“. Batali ne signifas vivi en komforto; ĝi devigas ĉiujn alporti eĉ oferojn. Pli da disciplino kaj respondeco estas al la venko de la esperantista movado necesaj

Aug. Pitlik.

AGRONOMIO: s-o L. M. Kanervo, s-o P. Marly, d-ro Siegel (abeloj).

FERVOJOJ: s-o Brettman, s-o Rudolf Fridrich, s-o Majoro R. Raven-Hart, s-o Francisko Schneider.

KONTADO kaj KOMERCO: s-o Jean Balliman, s-o J. Camescasse, s-o A. Ĉernohostov, s-o Karl, s-o Kurt Kauffmann, s-o Václav Němec, d-ro Paul Rumpel, s-o J. M. de Villa.

VITRAĴOJ: s-o Jean Balliman, s-o P. Marly.  
STOFOJ, PASAMENTAĴOJ: f-ino Jeanne Flourens, s-o T. Lötzsch.

KONSTRUADO: s-o Jean Balliman, s-o G. Arthur Brown, s-o Francisko Schneider.  
ŜIPKONSTRUO: s-o A. Ĉernohostov.

### Belartoj.

ESTETIKO GENERALE: s-o Georg J. Meyer.  
ARĤITEKTURO: s-o F. O. Lechmere-Oertel.  
DESEGNO: s-o A. Mazzolini.  
MUZIKO: s-o Montagu C. Butler, s-o W. Kalitzke (muzikaj instrumentoj), d-ro Paul Rumpel, f-ino Ad. Sefer.  
SPORTOJ: d-ro Paul Rumpel.

### Literaturo.

S-o Rudolf Fridrich, s-o Georg J. Meyer.

### Geografio kaj Historio.

HISTORIO: s-o Norman W. Frost, s-o Georg J. Meyer.  
KULTUROJ: d-ro E. Dittrich, s-o G. Kayser.  
GEOGRAFIO: s-o A. Ĉernohostov, s-o Norman W. Frost.

### Nedefinitaj Fakoj.

S-o Anatolo Koch, s-o Stefano La Colla.

(Flota.)

## Oka Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj.

La 14-an de aŭgusto matene en la ĉarma, belege ornamita salono de Sofia Komercia Ĉambro, la prezidanto, s-o Aktardjiev, malfermis la 8-an Kongreson de Bulg. Esp. Soc. Ĉeestis pli ol cent personoj, inter kiuj oni vidis homojn de diversa aĝo kaj profesio: advokatojn, studentojn, oficistojn, komercistojn, instruistojn kaj lernantojn. Feste vestitaj virinoj kolorigis la bildon.

La reprezentanto de la instruistoj diris, ke la ministro forvojaĝis el Sofia kaj ne povas plenumi sian deziron saluti persone la kongreson. La reprezentanto prelegis leteron, en kiu s-o ministro, kiu per leĝo permesis la fakultativan instruadon de Esperanto en gimnazioj, promesas, daŭrigi estonte sian helpon al nia lingvo tiel rapide disvastiganta en la kultura mondo.

La vicurbestro eldiris la ĝojon de Sofia, akcepti kiel gastojn la kongresanojn, deklaris sian kontenton koncerne oficialan enkondukon de Esperanto, je kies sukceso li kredas.

La reprezentanto de la „Societo de l' Sofiaj Komercistoj“ prezentis sian simpatiplenan parolon: „Ni bezonas vian lingvon, kaj ni, la komercistoj, vivmaniere helpas al via movado. En la baldaŭ elironta organo de Bulg. Komercista Unuiĝo ni volonte publikigos esp. artikolojn por konatigi Esperanton al la komercistaro.“

La ĉeestanta direktoro de „Konsorcium“, grava ŝtata instituto, kiu sola havas la rajton eksporti grenon, s-o Karadjov, deklaris, ke li havis bonan okazon konvinkiĝi en la internaciaj kongresoj de kooperativaj sindikatoj pri la vero, ke nur neŭtrala lingvo (kiel Esperanto) estas akceptebla kiel internacia. Germanoj kaj flandroj (Belguloj) batalis kontraŭ la propono, farita en la kongreso, ke la internacia kooperativa gazeto estu redaktata franc-lingve. Sekve de tio oni ne povis ebligi tiun ĉi gazeton.

Salutis la kongreson ankaŭ la vicprezidanto de Sofia Komercia Ĉambro, s-o Karastojanov, reprezentantoj de Ruĝa Kruco, de Turista Klubo, Junula Tur. Klubo, Societo de Verkistoj kaj Societo de Sofiaj Journalistoj, kies reprezentanto deklaris, ke ili volonte publikigos esp. artikolojn.

En la laborkunsido, konforme la decido de Pleven'a grupo, s-o Angel Simeonov proponis ŝanĝon de la statuto: nia societo konsistu ne el izolitaj individuoj, sed el lokaj grupoj, kies centra regado restu en Sofia. Tiu formo estas ne nur taŭga kaj praktika, sed ankaŭ plene respondas al la bezonoj de la jam plivigliĝinta movado. Malgraŭ la kontraŭstaro de l' kongresprezidanto, s-o Jurdanov, la kongreso preskaŭ unuanime akceptis tiun utilan proponon.

Konforme al la leĝo, la kongreso decidis, ke ĉiu grupo zorgu pri malfermo de esp. klasoj en la gimnazioj dum tiu ĉi jaro.

En la lasta kunsido s-o Dobrev rakontis la vivon de mortinta Hristoskov, kiu — estante junulo-vilaĝano — per meminstruo fariĝis unu el la plej bonaj bulgaraj esperantistoj. Redaktoro de „Bulg. Esperantisto“, s-o Atanasov, en sia parolado montris utilajn propagandrimedojn. Pri tiu demando parolis kelkaj personoj, inter kiuj la subskribinto, kiu invitis la Centran Komitatojn zorgi pri starigo de Internacia Esp. Servo, kies gravecon por la propagando ĉi komprenas; ankaŭ pri la fono de speciala komitato, kiu dissendu al la komercistaro kaj tiamaniere utiligu propagandecole la senpagajn cirkulerojn de komercaj folioj.

Ĝojan impreson naskis ĉe la kongresanoj la ĉeesto de s-ino Budevskaja, unu el la plej talentaj, famaj kaj estimindaj artistinoj ĉe nia ŝtata teatro en Sofia. S-ino Budevskaja, kies du filoj estas fervoraj esperantistoj, preskaŭ regule vizitis, interese plene aŭskultis, eĉ kelkfoje diskutis ĉe la kongreskunsidoj. Ŝi plenrajte meritas nian dankegon.

Ne nur la ĉeesto de tiom da oficialaj personoj, ne nur la partopreno de delegitoj el tuta Bulgario, sed ankaŭ la plenumita laboro por la evoluo kaj sukceso de Bulg. Esp. Soc. faras la Okan memorinda en la historio de la esp. movado en nia lando. Bulgarioj alie tenas la verdan standardon sur la Balkan-duoninsulo!

Angel Simeonov.

## Atentigo al ne germanaj abonantoj.

Neatenditaj plikostoj por salajroj, papero kaj preskaŭ ĉiuj materialoj kaj minacanta pilatigo de la afranko devigas nin fiksi novajn abonkondiciojn.

Antaŭ ĉio, pro la granda malaltiĝo de la germana valuto, eĉ estonte ni povos akcepti abonpagojn en germana mono nur laŭ la taga kurzo.

La abonoj por la diversaj landoj estas de nun:

12 avia. fl., 8 fl., dan. kaj norv. kronoj, pes., 10 aved. kr., 6 guldonoj, 8 dolaroj, 20 fr. aŭ belg. fl., 30 liroj, 60 finn. mk., 70 ĉal. kr., 200 hung. kr., 300 aŭst. kr., 800 poln. mk.

Balkanŝtatoj, Litovio kaj Latvio pagu 60 germ. mk., Estonio 40 germ. mk.

Al poloj, aŭstroj, hungaraj kaj estonaj abonantoj ni sendos du n-ojn kune.

Ne estas necese pagi tutan jaronon je unu fojo. Oni alsendu laŭvolan sumon (en naciaj bankbiletoj per registrita letero), kaj ni sendos tiom da numeroj de nia ĵurnalo, kiom valoras la pago.

La prezoj por la opa vendado altiĝas nur post la pliamplektaĝo de ET meze de oktobro.

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

Orient-Nederlanda Esp. Kongreso okazas la 18-an de sept. en Deventer, hotelo „Klein-Scheveningen“.

Kongreso de Sviza Esp. Societo okazos en Olten la 24.-25. sept. 1921.

Helpo al malsatantaj rusoj.

Fervora grupano de „Lemana Stelo“ en Montreux (Svisl.), s-o Gaston Messenger, donas 2% el la taga enspezo de sia „Internacia Spicvendejo“ por malsatantaj rusoj. Imifinda ekzemplo de vera esperantisto.

Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj.

Kiel la lastjara, tiel ankaŭ la nunjara kunsido de Ligo de Nacioj devos pridiskuti proponon pri akcelado de la internacia helplingvo. La proponitoj estas la delegitoj de la ŝtatoj Sudafrika, Rumana, Serba, Belga, Ĉeĥoslovaka, Kolumba, Venezuelo, Ĉina, Japana kaj Finna. La pola delegito subsignis je la rezervo, ke kiel internaciaj lingvoj estu konsiderataj nur tiuj lingvoj, kiuj neniel tuŝas la dejarcentan rajton kaj reputacion de la franca lingvo kiel internacia diplomata lingvo.

Ĉe la subskriboj mankas la nomoj de la delegitoj de ŝtatoj Brazilo, Ĉilo, Hindio, Haito, Italio kaj Persio, kiuj subtenis la proponon en antaŭa jaro. Sed ni vidas kelkajn novajn proponintojn la delegitojn de la ŝtatoj Rumano, Serbio, Finnio, Japanio, Venezuelo kaj (je rezervo) Polio.

Ni ne volas esti tiel optimistaj, ke ni kredas je pli bona rezulto nun ol en antaŭa jaro; sed la propono estas per si mem grava propagando por nia afero, kaj — ĉiam denove prezentata — ĝi fine tamen sukcesos.

Konkurso Lepine,

eksponcio de malgrandaj francaj inventistoj (eltrovistoj) sur la Esplanado de Invalidoj en Parizo, montras ankaŭ esp. kioskon de s-o Herlemont.

Turismo.

La prezidanto de la esp. sekcio de l' franca Turing-Klubo (plej grava turista organizo sub la protekto de la prez. de la respubliko), kolonelo Renard, sendis al ĉiuj delegitoj de la klubo cirkuleron pri la utileco de Esperanto dum vojaĝoj.

Internacia Universitato en Bruxelles.

Dum 20. aŭg. ĝis 5. sept. okazis ĉe Internacia Universitato paroladoj de s-o Chavet pri la eduka valoro de Esperanto, de s-o Demarcy, jura licenciato, pri la facileco kaj praktikeco de Esp., de s-o Muffang, prof. en liceo de Angers, pri Esp. laŭ gramatika vidpunkto.

Kongreso de la Int. Komercia Ĉambro en Londono, pri kiu ET jam parolis, akceptis voĉdonon favoran al Esperanto, laŭ sciigo de „Lyon République“, grava Lyon'a gazeto.

Brita Asocio por Akcelado de Sciencoj pri internacia helpla lingvo.

Dum la kongreso de British Association for the Advancement of Science, okazinta en Edinburgh de 7-a ĝis 14-a de septembro, ĉe kunveno de la Eduka Sekcio de la Kongreso en la Universitato je la 9-a de septembro, estis oficiale prezentata raporto de komitato starigita de la asocio en 1919 por esplori la praktikeblecon de internacia helpla lingvo. La raporton prezentis d-ro E. H. Tripp, sekretario de la komitato. Ĝi estis subtenata de d-ro F. G. Cottrell, prezidanto de la fakto de kemio kaj kemia teknologio de la nacia esplora konsilantaro de Usono. Diskutado sekvis, en kiu la polemiko inter idlistoj kaj esperantistoj sin trudis kaj kreis malfavoran impreson. Tamen la kunveno fine akceptis la raporton kaj decidis sendi ĝin al la Ligo de Nacioj. Pri la raporto ni parolos ankoraŭ detale en nia venonta numero.

El Tokio.

„La Revuo Orienta“ raportas en siaj junioj kaj julioj numeroj pri vigla movado en Tokio, Kioto, Jokosuka, Ŝizuka, Okajama, Osaka, Kagoŝima kaj Sapporo; sed plej vigla la movado estas en la ĉefurbo mem. Ni notas mallonge jenajn propagandajn kunvenojn, purladojn kaj kursojn pri Esperanto en Tokio: Komercia Universitato, kurso kun 200 personoj; Komercia Kolegio de Takaĉiĥo Instituto, kurso kun 80 p.; Imperia Universitato, propaganda kunveno kun 350 partoprenantoj; l-a Nacia Kolegio (Itiko), prop. kunv. kun 150 p.; en sama kolegio kurso kun 100 p.; Aojama Instituto, prop. kunv.; Keio Universitato, prop. kunv. kun 100 p.; en sama universitato kurso kun 30 p.; Universitato Hosei, kurso kun 20 p.; Waseda Universitato, kurso; Nippon Virina Universitato, prop. parolado kun 350 p.; Kristana Asocio por junulinoj, Kanda, Tokio, esp. kurso; Domego de princo Tokugava, prop. parolado kun 350 p.

## Alvoko

al la tutmonda esperantistaro.

Por prezenti al nia Ministerio materialajn pruvojn pri ekzistado de stratoj, bulvaroj, placoj kun la nomo de Zamenhof aŭ Esperanto, Esp. Rondo „Konkordo“ en Varsovio bezonas konkretajn dokumentojn (protokolojn, fotografiojn, oficialajn dokumentojn ktp.). Tiucele ni petas ĉiun

samideanon povantan nin tiudirekte helpi, turni sin al la sekretarino de „Konkordo“ (d-ro Paulina Muszkatblat, Warszawa, Polujo, Krochmalna 15). Estas dezirinde, ke tiu ĉi alvoko estu tradukata kaj presigata en naciaj gazetoj.

## Nia redakcia kesto

abundas pro amaso da manuskriptoj ĉiuspecaj. Ni petas niajn ŝatatajn kunlaborantojn, ke ili provizore alsendu sole raportojn (do nek literaturajn nek sciencajn artikolojn), sed ankaŭ tiujn nur pri gravajoj kaj nur koncizajn. Alvokojn, petojn k. s. ni akceptas ne volonte, ĉar ili forprenas multe da loko kaj havas malgrandan efikon. Kelkaj rubrikaj lastatempe forlasitaj povos reapari nur post malpliigo de niaj manuskriptoj, ekz. Parolejo, Tra la Mondo, Sporto, kaj a. Ni atentigas, ke de mezo de oktobro ET aperos en pli granda formato.

## Recenzejo.

(Unuope senditajn librojn ni mencias, duoble senditajn ni recenzas. Monataj esp. gazetoj sendu du ekzemplerojn interŝanĝe kontraŭ unu ekz. de nia semajna ĵurnalo.)

LIBROJ.

LA LASTAJ TAGOJ DE D-RO L. L. ZAMENHOF kaj la funebra ceremonio. Eldonis Adolfo Oberrotman kaj Teo Jung. 1921. 48 pg. 15 : 17 cm. Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“, Koln-Horrem (Germ.). Prezo bele kartonite kaj presite sur luksa papero 15 mk.

Kiel memorajon pri la morto de nia majstro kaj kiel propagandilon por starigota monumento sur lia tombo la eldonintoj aperigis bonegan libron, kiun ĉi el ni devas posedi. Ĝi ne estas tre ampleksa, sed ĝi enhavas fotografiojn de d-ro Zamenhof el la jaro 1916 kaj dek fotografiojn de la enteriga ceremonio kaj de la tombo de nia neforgesibla gvidinto.

Ni vidas sur ili la funebran procesion sur la Teatrajna ulico en Warszawa, la portadon de l' ĉerko sur la tomb-ejon, la predikanton de la sinagogo dum lia parolado antaŭ la funebrantaro, la ĵus mortintan pioniron de Esperanto Ing. Antoni Grabowski, la enterigan ceremonion, la tombon ktp.

El la enhavo de la libro mi citas poeziajn de nia pola samideano Belmont, longan raporton de s-ano Walter pri la lastaj tagoj de l' mortinto kaj pri la funebra ceremonio. Oni preskaŭ ploras legante pri la egaj suferoj de d-ro Zamenhof, kies lastaj tagoj estis turmenta kaj dolorplena batalo; sed li tamen ne plendis. Li vivis kaj mortis kiel sanktulo. Li dormu dolĉe! Ankaŭ la funebraj paroladoj de s-anoj Belmont kaj Grabowski estas precitaj en ĉi tiu libro, same du belaj poemoj de la hungaro Baghy kaj de s-ano Hiller. La alvoko (sur la lastaj paĝoj) al tutmonda monokoleto por monumento al d-ro Zamenhof estas preparita dum la 15-a kongreso en Praha. Oni unuanime aprobis kaj subtenis la decidon de l' organiza komitato; ĉiu do donu monon, por ke l' monumento estu baldaŭ konstruata kaj starigata sur la tombo, en kiu nia kara majstro ripozas.

De la libreto, kiu estas dediĉita al s-ino Klara Zamenhof, nur malgranda kvanto estas presita. Oni do ne prokrastu la mendon. (G. Ajul.)

Atentigo. En lasta tempo aperis — ĝojige! — tiom da novaj esp. libroj, ke ni devus disponigi preskaŭ tutan numeron sole por recenzoj. Ni petas la sendintojn de recenzotaj, ne maltrankviliĝi pro tio, ke iliaj eldonitaj ankoraŭ ne estas recenzitaj. Ni forgesas nenion.

## Gazetaro.

Esperanto en francaj gazetoj.

LE MONITEUR DE L'OISE, ĉiutaga en Beauvais, 28. aŭg., kun artikolo por Esperanto de Baudet, membro de la pariza komercia ĉambro.

LE CHRETIEN LIBRE en Melun, repreas en maja-junio n-o la rezolucion de 21 membroj de la Franca Scienca Akademio.

LA FEMME ET L'ENFANT, dusemajna en Parizo, komenciis kurson de Esperanto en la n-o de 1. sept.

LE PROGRES CIVIQUE, ĉiusemajna en Parizo, 18. aŭg. Kun artikolo pri Praha kongreso.

LA REPUBLIQUE DE L'OISE, Beauvais, 4. sept. Kun artikolo pri la parolado de s-o Demarcy, prez. de la loka grupo, en Intern. Universitato en Bruxelles.

L'INDEXE DES INDUSTRIES DU CUIR (La Indekso de ledaj industrioj), monata en Parizo, aŭg. Artikolo en franca kaj esp. lingvoj: „Pri la esp. movado“ kun respondo al skeptikaj legantoj.

LA REVUE DU TOURING-CLUB DE FRANCE, aŭg.-sept. Notoj pri la 15-a kaj pri korespondaj kursoj de Esp.

LES ECHOS DE L'EXPORTATION, „Paroloj de komercisto“ de E. S. pri neceso de Esperanto por kontraŭbatali la influon de angla lingvo.

Dimanĉon la 4-an de septembro mortis subite je la sekvoj de apopleksio en la urba parko de Praha s-o

## d-ro František Kohout

kalkul-vic-direktoro de la landa administracia komisiono el Praha-Dejvice.

Ankoraŭ antaŭ malmultaj semajnoj ni povis paroli kun li sana dum la kongreso, kie li entuziasme salutis la klopodojn al la restarigo de la sciencaj institucioj! Li ja ekvidis la eblecon povi malkaŝi al la publiko la frukton de sia longjara, malbrua laborado: starigo de giganta vortaro matematika!

Kun granda ĝojo li akceptis la oficon de Komitatano, kaj ni esperis povi ankoraŭ longe profiti je liaj konsilo kaj sperteco!

Kiel unua li estis devigata ekŝiĝi el la komitataro, sen ke li estus vidinta la sukceson de liaj kaj niaj klopodoj!

Ni funebru ĉe lia tombo, promesante agadi en liaj noblaj intencoj!

D-ro Walter Döhler, Riesa (Germanl.) en la nomo de la Komitato por la novstarigo de Int. Scienca Asocio kaj Scienca Revuo.

## Anoncetoj.

VIZITANTOJ DE KINEMATOGRAFO el ĉiuj landoj (krom Germani!)! Kiu el vi pro perfektigo en Esperanto aŭ kontraŭ laŭdeziraj reciprok-servoj malfanke sendadus al mi detalajn filmenhavojn (aŭ presitajn kinematografajn programojn nacilingvaj) de la plej novaj filmoj de via lando? Menciuj fabriklirmon! Poŝtelspezojn mi redonos. V. Markuse, cand. phil., Berlin-Wilmersdorf, Duisburgerstrasse 3, ll.

AMO PER PROVERBOJ. Unuakta komedio de Arthur Azevedo. El la portugala lingvo tradukis A. Couto Fernandes Eldonejo Oskar Ziegler & K-jo, Markt-Redwitz (Germ.). Prezo 3 resp. kuponoj. Aĉetebla ĉe la tradukinto: Laranleiras, 225. Rio de Janeiro, Brazilio. — Komedio tre taŭga por la prezentado.

PETO. Estante en mizera situacio, mi petas samideanojn helpi al mi per iu ajn sumeto. Mi estos tre dankema kaj rekompencos ĉion, kiam mia situacio plibonigos. Mi estas 3 jarojn en rusa militkaptiteco, plene ruinigis kaj, veninte hejmen, nun devas multon malhavi. Bonvolu ion sendi al Szekacs Laszlo Pal, Vacz, Bathori-u. 5 (Hung.).

PROPAGANDILOJN ĉiuj landoj bonvolu sendi por granda propaganda ekspozicio okazonta dum la 11-a Germana Esp. Kongreso 1922 en Breslau al Georg Habellok, Breslau 10 (Germ.), Schleiermachersstr. 19. Mi kompenso ĉiun sendaĵon per il. poŝtk. de Breslau.

INGENIERO-konstruisto-fervoiŝto, solema, 35-jara, serĉas fakan okupon ĉe ekspluato aŭ konstruo de fervojoj. Dezirindaj landoj por mi estas: Afriko suda aŭ norda, Argentino, Brazilio, Ĉilio, Ĉinio, Jamajka insulo, Urugvio, Aŭstralio, Nova Zelando kaj aliaj ne-eŭropaj landoj. Proponoj oni bonvolu sendi laŭ adreso: Pol-lando, Tarnow, poste restante, al inĝeniero Ilya Dobrenko. Kolegojn kaj samideanojn mi petas helpi min en tiu ĉi afero.

HUNGARLANDA ESP. SOCIETO Invitas al sia ĝenerala Jarkunveno en Budapeŝt (1.-2. okt. en Socia Muzeo, VI, Eötvös u. 3). Amuza kunveno, labora kunsido kaj literaturo festeno. Oni esperas, ke ĉiuj provincoj venos.

EDZIGO. S-o Rudolf David, Reichenberg (Liberec), Ĉeĥoslovakio, Rollgasse 3, serĉanta bonan edzinon, deziras korespondi kun edziniĝemaj junulinoj.

### Korespondo kaj Interŝanĝo.

Manuelo Palomera, Cardenal Casanas 10, Barcelona, Hispanujo, deziras korespondi per poŝtkarto aŭ leteroj kun la tuta mondo.

F-ino Trezka Forgon, muzik-akademiano, Debrecen (Hung.), Teleki 84, deziras korespondi letere pri ĉiuj ajn interesa temo kaj interŝanĝas belajn ilustr. poŝtkartojn.

S-o Sam Owen Jansson, Skogen 28, Lidings Villastad, Svedujo, studanto, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj kun ĉiujlandaj samideanoj. Kolektas poŝtkartojn.

S-o Johannes Tamverk, Karja 5, Haapsalu, Estonio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bildit.) nur kun fraŭlinoj.

S-ino Hilja Valve, Kausala, Radonsuu, Finnlando, deziras interŝanĝi poŝtkartojn, ilustr. poŝtkartojn de vidindaĵoj kaj pejzaĝoj.

S-o Viadas Niunkis, 14-jara gimnaziano de V-a klaso, Interŝanĝas per poŝtkarto ilustr. kaj poŝtkartojn. Adreso: Litovio, Šiauliai, Telegrafas, Niunkel.

Vladimir Peresadin, 16-jara, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun gejunuloj el ĉiuj landoj. Petrograd, Rusio, Nikolaevekaja 74.

Anna Pileva, Rusujo, Ukrainio, Zmiev, Uprodkom, deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj.

Petro Egorov, Rusujo, Petrogrado, Vas. Ostrov, Koŝevnaja linia 25, loĝ. 68, deziras korespondi kun samideanoj pri anarkio.

Mi serĉas personojn, kiuj deziras korespondi pri infana psikologio, pedagogio kaj eksperimenta psikologio. Sciigu novaĵojn, sendu priskribojn de laboroj kaj organizaĵoj. Responde mi komunikos la sukcesojn, kiujn ni havas en tiuj ĉi sciencoj. Sendu librojn, fotografaĵojn ktp. al Direktoro de Eksperimenta Psikologia Laboratorio, s-o Vs. Basov en Orel, Ruslando, 2-a Posadskaja str. 19.

Hellmut Schmidt, Breslau 18, Ahornallee 6, Germ., deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn, precipe el Sud-Eŭropo.

Wilhelm Lang, Essen-Dellwig (Germanio), Lutherstr. 8, Interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn (bildit.) kun la tuta mondo.

S-o Hans Wolf, Stuttgart (Germ.), Hahnstr. 60, Interŝanĝas poŝtkartojn por virtemb., bavar. kaj germanaj poŝtkartoj kaj donas poŝtkartojn ilustritajn por poŝtkartoj.

Mi deziras korespondadon kun ĉiuj landoj per leteroj, ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtkartojn. Joseph Düllmann, Hagen i. W., Germ., Körnerstr. 75.

## Maŝino

speciale konstruata

por  
ondigo de ŝtalfolioj  
uzataj kielolveblaj negocfermiloj estas serĉata.

Adresu proponojn al inĝeniero  
M. de Balzac, via Parini 10, Torino, Ital.

## 1914-1918.

1. La germana militŝiparo dum la mondmilito. 500 fotografaĵoj en poŝtkarta formato; bildoj montrantaj historiajn momentojn el la marmilito, agoj de la submarboatoj, batalmomentoj, grenadtrafoj, ŝipsubiroj kaj aliaj vidindaĵoj. Unuaranga kolekto. Prezo po 1 ekz. 60 germ. pf.
2. Albumo enhavanta serion de germ. submara boato dum transmara veturado en malproksimaj regionoj. Po ekz. 8 germ. mk.
3. La mardialbo (Seeteufel). Kaperveturoj de la fama kaperalpo „Seeadler“, la heroaj agoj de grafo Luckner (2500 marmelloj en velboato kun 5 marlistoj), po 80 germ. mk.

Eldonejo Fritz Finke, Wilhelmshaven, Germanio.

Oni korespondas en Esperanto.

# Zalbide, Alvarez & Co., Ltd.

London — Bilbao — Rio de Janeiro — Buenos Aires.

Membroj de la Borso de Feroj kaj Ŝtaloj en London.

Ĝeneralaj vendagentoj por feroj kaj ŝtaloj, metaloj ĉiuspecaj, reloj kaj fervoja materialo, iloj kaj similaj.

Reprezentoj — Komisioj — Maklerado — Konsignoj.

Londona direktoro (s-o Alvarez) vizitonta la Foiron de Frankfurt (fine de septembro 1921) deziras proponojn de gravaj kontinentaj fabrikistoj celantaj reprezentadon en London ĉefe por metaloj, tuboj, fadenoj, lamenoj en ŝtalo, kupro, nikelo ktp.

Ĉiuj ajn metaloj aŭ industriaj materialoj en granda demando.

Skribu tuj (esperante, angle, france, hispane aŭ germane) al la firmo: 5/6 Broad Street House, New Broad Street, London, E. C. 2.

## Komercistoj kaj Reprezentantoj

serĉataj por ĉiuj landoj por la vendado de ĉiuspecaj facile vendeblaj komercaĵoj.

Komercista  
Esperanto-Grupo  
Freiburg i. Br. (Germani.),  
Katharinenstr. 14.

Ni peras ĉiuspecajn negocojn.  
Rektaj rilatoj al gravaj germanaj firmoj.  
Perado senkoste. Uzu niajn servojn!

## Intarsioj.

Marketro-fabrikoj el ligno, perlamoto kaj metalo por fabrikejoj de mebloj, horloĝoj je favoraj kondiĉoj liveras

H. Knaup, Artmetiejo por Intarsioj,  
Karpfengasse 8, Heidelberg (Germanio)

Oni petu specialan proponon! Reprezentantoj serĉataj por ĉiuj landoj.

## VITRO-PENTREJO

Emil Weiler, Freiburg i. Br.  
Starkenstr. 21 (Germanio.)

Speciala ateliero por unuarangaj „Svisaj-majstro-vitroj“ insignovitroj, emetoj ktp. en antikvaj specoj. — Petu prezojn kaj desegnojn. — Reprezentantoj serĉataj. — Eksperto ĉiulanden.

Jus aperis:

## Katalogo pri Pola Esp. Literaturo kaj Esperantaĵoj

montranta majstre tradukitajn verkojn aŭ originalaĵojn de niaj eminentuloj L. Zamenhof, Grabowski, Belmont, Kabe, Kuhl k. a., riceveblaj ĉe P. E. S.

Tuj postulu la katalogon! Vi ricevos ĝin senpage.

Por sendkostoj aldonu 1 internacian stampitan resp.-kup. aŭ koncernan kvanton da ŝtataj poŝtkartoj nestampitaj, aŭ nacian monon.

Adreso:

Pola Esp. Servo (P. E. S.)

s-o Fr. Prengel, Bydgoszcz (Polio), Kordeckiego 1a.

Atentu la novan adreson!

## Horloĝoj ĉiuspecaj

poŝ-vechorloĝoj, malgrandaj vekhorloĝoj, star- kaj murhorloĝoj en plej bona kvalito. — Demandu prezaron! — Reprezentantoj serĉataj.

HERMANN TOBUSCH,  
horloĝ-eksperto, Freiburg i. Br.  
Kaiserstr. 16. (Germanio.)

## Artaĵo-, Bildo-, Libro- Vendistoj kaj Art-Amikoj,

kliuj havas intereson por belegaj akvareloj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstria, turnu sin al

SEPP OSTERER, GRAZ, AUSTRIO,  
Gleisdorfergasse 5.

Favora okazo por eksterlandanoj pro la malalta valuto aŭstria.

## Kio estas „Vitamin“ ??

Atentu malsanuloj! Ĝi estas la plej bona fortiga kaj evoluiga nutraĵo por plenkreskuloj, subnutritoj, anemiuloj, nervo- kaj pulmomalsanuloj kaj malfortigitoj.

Multaj laŭdoj de kuracistoj kaj malsanuloj atestas la bonan efikon de Vitamin.

Pezopliĝo ĝis 4 kilogramoj en 6 semajnoj!! Pakitaĵoj 500 g 20 germ. mk. Prospektaj kaj forsendado per

E. Heyn, fako de Vitamin-Indrustio, Loschwitz bei Dresden, Germ.

## Novaĵo: BONHUMORAJ RAKONTOJ

el hungara literaturo.

Samgranda kiel „Ses Noveloj“.

Rekomendita de E. L. A.

Ricevebla kontraŭ sendo de 3 germ. mk., 3 ĉ. kr., 0,50 fk. ktp. ĉe

P. Balkanyi, Budapest VI, Hajos ut. 15-II-2.

Mendu tuj pli multajn ekzemplerojn!

Internacia Eksped- kaj Transport-Oficejo  
ALEKSANDER ROZANYKIWIAT & K-jo, VARSOVIO, DLUGA 23.

## KOMERCAJ-EKSPEDADO

al ĉiuj urboj de Polujo, Litovujo, Germanujo, Aŭstrio, Francujo, Rumanio, Usono kaj „vice-versa“.

Dogano, enkasigo, asekurado de ŝarĝaĵoj kontraŭ tuta aŭ parta ŝtelo.

Propraj tenejoj korespondantaj en 42 urboj.

Oni korespondas en ĉefaj eŭropaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto.

Oni serĉas rilatojn kun seriozaj eksterlandaj eksped- kaj transport-firmoj.